



Paco en la israela pac-oazo: pri la 10-a KIES

Israelanoj tre modeste nomas sian aŭtunan aranĝon KIES, Komuna Israela Esperanto-Semajnfino. Fakte temas pri speco de landa kongreso, kiun partoprenas esperantistaj aktivuloj el ĉiuj partoj de la lando. Ĉi-jare, de la 22-a ĝis la 24-a de oktobro, estis proksimume 50 israelanoj kaj deko da eksterlandanoj en la vilaĝo kun la nomo Neve Shalom/Wahat-es-salam [Pac-oazo], kiu estas konata al la esperantistoj pro seminario antaŭkongresa okazinta tie, kiam la UK estis en Telavivo.

La elekto de la loko ne estis hazarda. Ĝi kongruis kun la ĝenerala temo de la ĉi-jara KIES: Paco kaj kunekzisto! Tiun parton de la programo traktis prelego de respondeculo de la vilaĝo pri la eksperimento igi saman nombron da israelaj kaj arabaj familioj kunloĝi kaj kundecidi pri sia estonteco en la sama vilaĝo. La eksperimento estas sukcesa, sed apenaŭ imitata en la regiono. Provokajn demandojn al la israelaj esperantistoj prezentis mi mem, klarigante kiel duono de la mondo taksas la situacion de la Meza Oriento kaj la problemojn por alveni al paco. Ne temis pri prelego sed pri diskutado kun la partoprenantoj, kiuj tre vigle diris siajn, ofte esence malajn, opiniojn. La komuna pripensado pri la temo estis nur semo por posta pripensado. Sed la programo antaŭvidis multe pli ol tion. Estis prelegoj pri

kibucoj (kien nun?) de Cvi Ŝolt, pri teleskopoj (Amri Wandel), pri interlingvistiko (Alicja Sakaguchi), pri go-ludo (Gian Piero Savio), pri la venontjara rusa jubilea kongreso (Anna Butkevich), pri vojaĝoj ĉe Mediteraneo (Ĵunko Oŝima) kaj kantado kaj dancado. Kiel vi vidas el la nomoj de la prelegintoj la tuto estis sufiĉe internacia, sed evidente israelanoj bezonas multe pli da eksterlandaj partoprenantoj, kiuj interalie havas tre klaran kontraŭ-krokodilan funkcion.

Eksterlandaj partoprenantoj havis (kaj ĉiujare havas) tre grandajn eblojn ekskursi al Jerusalemo, al la Morta Maro ktp. Resume: malgranda kongreso, kiu meritas la atenton de ĉiuj esperantistoj. Se vi jam vidis ĉion en la movado sed ankoraŭ ne vidis la israelajn esperantistojn, vi maltrafas multon.

Renato Corsetti